

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報導

EN TIU ĜI NUMERO:

Interbrakumas Ĉinio, Koreio kaj Hungario

Fama Sciencisto Persekutata de Usonaj Imperiistoj

Arde Mi Amas la Novan Pekinon

Ne Dolĉas Melono Desirita Perforte

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. II N-RO 3
MAR. 1951

Nova Epoko Por

E-Movado en Ĉinio

Je la 11a de marto en la granda halo de la Kultura Klubo de la Tutlanda Komitato de la Popola Politika Konsiliga Konferenco en Pekino malfermiĝis la Fonda Kongreso de Ĉina Esperanto-Ligo. Ĉeestis k-doj Hujuez (胡愈之) pioniro de Ĉina Esp-movado kaj estro de la Administracio de Eldonado, Ĉ. Cen, sekretario de la Prepara Komitato de Ĉina Esperanto-Ligo kaj reprezentantoj de esperantistaj organizoj el diversaj lokoj de la lando, entute pli ol cent esperantistoj. Ĝin honoris ankaŭ k-do Jang Han-seng (楊翰生), vic-ĉefsekretario de la Komitato de Kulturaj kaj Edukaj Aferoj de la Centra Popola Registaro, k-do Hung Sen (洪深), estro de la Buroo por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandoj, k-do Liu Zun-ĉi (劉尊棋), vicestro de la Informa Buroo.

En la malferma parolado k-do Hujuez kategorie kritikis la ĝeneralajn malĝustajn opiniojn de la kapitalistaj lingvistoj kaj la etburgajn revojn pri Esperanto kaj akcentis la valorojn de Esperanto en la batalo por mondpaĉo kaj interkompreniĝo de la pacamaj popoloj. Interalie li konsilis la ĉinajn esperantistojn konservi la gloran tradicion de ĉinaj progresemaj esperantistoj, kiuj estis persekutataj, mortigitaj pro la batalo, kaj unuigi por servi al nia granda popola patrio kaj la mondpaĉo.

Ambaŭ k-doj Jang Han-seng kaj Liu Zun-ĉi multe laŭdis la meritojn de ĉinaj esperantistoj kaj la praktikajn valorojn de Esperanto.

Imponaj estas la 158 saluttelegramoj kaj salutleteroj alflugintaj el diversaj landoj. Ili estas parte legataj kaj parte ekspoziciataj kun ĉinlingva traduko sur la muroj. Tio donas profundan impreson al la ĉeestantaj kamaradoj kaj des pli al la neesperantistaj vizitantoj.

Fruktodona estis la laborkunsido ptm. Unuanime aprobitaj estis la deklaro de la kongreso, la statuto de la Ligo kaj la salutletero al Prezidanto Maŭ Ze-tung. Diskutitaj kaj deciditaj ankaŭ multaj proponoj pri esperanta movado.

La kongreso altiris grandan atenton de la publiko. Sinhua-Novajo-servo, la oficiala tutlanda novaĵoservo de Popola Ĉinio, raportis pri la kongreso kaj la pasinta batalo de la ĉinaj esp-istoj. Ankaŭ la Popola Tagjurnalo, la centra organo de Ĉina Kompartio, ĵurnaloj en diversaj urboj tra la tuta lando kaj la radiostacio en Pekino raportis pri tiu ĉi epok-fara kongreso.

Ni sincere dankas ĉiujn salutintojn al nia fonda kongreso.

Ĉina Esperanto-Ligo

Batalu por Pakto de Paco!

Por plenumi la esperojn de miloj da popolanoj tra la tuta mondo, kia ajn estas iliaj opinioj pri la kaŭzoj kiuj estigas la dangeron de mondmilito; por fortigi pacon kaj gardi internacian sekurecon, ni postulas la kontrakton de pakto de paco inter la Kvin Grandaj Potencoj: Usono, Sovetunio, la Ĉina Popola Respubliko, Britio kaj Francio.

Ni konsiderus rifuzon al kunveno por kontrakti tian pakton, fare de la registaro de iu ajn el la Grandaj Potencoj kiel ateston de la agresa intenco de la koncerna registaro.

Ni alvokas ĉiujn pacamajn naciojn subteni la postulon por ĉi tiu pakto de paco, kiu devus esti malferma al ĉiuj landoj.

Ni subskribas ĉi tiun apelacion kaj invitas ĉiujn virojn kaj virinojn bonvolajn, ĉiujn organizojn kiuj esperas pacon, aldoni siajn nomojn por ĝin subteni.

Jen la alvoko de la Monda Paca Konsilo, postulanta kontrakton de pakto de paco inter la Kvin Grandaj Potencoj. Tio estas la ĉefa kaj grava tasko en la defendo de mondpaĉo. Oni scias, ke Ĉinio, Sovetunio, Usono, Britio kaj Francio havas la ĉefan respondecon por konservi mondpacon, ĉar tiuj ĉi Kvin Grandaj Potencoj havas specialan influon sur internaciaj rilatoj. Kvankam ĉiuj landoj de la mondo havas sian parton de respondeco por paco, mondpaĉo povas esti garantiata nur kiam ĉi tiuj Kvin Grandaj Potencoj ĝin protektas. Tio estas la kaŭzo kial la Unuigitaj Nacioj je sia fondiĝo, memorante la sperton de malsukceso de la Ligo de Nacioj, decidis ke la Kvin Grandaj Potencoj estu konstantaj membroj de la Sekuro-Konsilo kaj ke decidoj de la Sekuro-Konsilo pri ĉiuj aferoj krom procedaj estu farataj sub la principo de unuanimeco de la kvin Grandaj Potencoj. Tio estas ankaŭ la kaŭzo kial la Sovetunia delegito energie rekomendis la kontrakton de pakto de paco inter la Kvin Grandaj Potencoj dum la 4a kaj 5a kunsidoj de la Ĝenerala Kunveno de UN.

La kontrakto de tia pakto signifas pacon kaj sekuron de la mondo. Alie, la mondo ankoraŭ restos dividita kaj minacata de militkrizo. Por paco kaj sekuro, la popoloj tra la tuta mondo

devas nepre aktive lukti por la tuja kontrakto de pakto de paco inter la registaroj de la Kvin Grandaj Potencoj. Estas neniam kialo por rifuzi tian pakton. Ĉiuj registaroj devas konigi sian sintenon kontraŭ mondpaĉo. Iu ajn el la koncerna registaroj, kiu rifuzas partopreni en la pakto, plene pruvus ke ĝi ne volas pacon sed persistas en agreso, kaj sekve estas la komuna malamiko de la tuta homaro.

La lukto por pakto de paco estos intensa kaj arda lukto inter la fortoj de paco kaj la fortoj de agreso. La Registaroj de la Popola Respubliko de Ĉinio kaj Sovetunio konsekvence sekvas politikon malebligigi militon kaj gardi pacon. Ĉi tiuj du registaroj plurfoje esprimis sian deziron vivi paco kun la popoloj de ĉiuj landoj en la mondo. Sed la imperiista agresa bloko estrata de Usono fervore preparante la revivigon de faŝista Germanio kaj militista Japanio, provas estiĝi novan militon kontraŭ la volo de la popoloj de la tuta mondo. La popoloj de la mondo, precipe de Usono, Britio kaj Francio, devas levigi kaj devigi siajn registarojn reveni al la kontrakto de ĉi tiu pakto.

Esperantistoj de la tuta mondo! Ĉu estas iomete da dubo pri tio, ke ni ĉiuj volas pacon kaj malamas invadan militon? Ne, tute ne. Ni ĉiuj, se ni estas veraj honestaj esperantistoj, certe volas pacon kaj malamas invadan militon. Zamenhof iniciatis la lingvon Esperanto ja pro porpaca motivo. Ni amas la iniciatinton kaj lian lingvon, kaj ĝin lernas, propagandas kaj uzas, ankaŭ pro la sama motivo. Tamen paco ne mem, venos pro nia espero aŭ volo, kaj invada milito, ne mem ĉesos pro nia malamo. Paco ni devas batalakiri kaj invadan militon ni devas malebligigi per batalo. Ni povas havi malsamajn opiniojn pri la kaŭzoj de mondmilito. Pri tio ni havos tempon diskuti. Ni povas havi malsamajn politikajn kredojn. Tempo kaj fakto pruvos kiuj estas pravaj. Ĉio ĉi neniel malhelplas nin kune batali por paco. Ne diru, ke ni estas simplaj civitanoj, ne estas ni kiuj decidis pacon aŭ militon kaj ni povas fari nenion se niaj registaroj volas militon. Ni estas la milionoj. Ni estas plej fortaj se nur ni stariĝas, unuigas kaj ekagas. Nun ni kaj niaj organizoj subskribu kaj subskribigu la

apelacion de la Monda Paca Konsilo por kontrakto de pakto de paco inter la Kvin Grandaj Potencoj. Ni vidu, kiu registaro kuragos, kontraŭ la volo de la milionoj da pacamaj popolanoj tra la tuta mondo, rifuzi kunvenon por tia pakto. Estas la devo de ni pacamaj esperantistoj, lidelaj al nia pacama majstro, bone uzi nian porpaca lingvon, por la aktuala porpaca batalo. Uzu nian lingvon por varbi aktivajn batalantojn por paco; eduki ilin, organizi ilin, por plifortigi la pactendaron tutmondan ke daŭra mondpaĉo esperata de ĉiuj bonvolaj homoj frue alvenu.



Ĉu li vere amas pacon?

Ma De

Interbrakumas Ĉinio, Koreio kaj Hungario

La ŝarĝaŭto plena je medikamentoj ekveturigas de Pjongjang.

Kiam Vang Huaj-tuo (王懷鐸) la konduktoro, ricevis sian taskon, al la superulo li jam garantiis: "Ni nepre transportos ĉi-tiujn medikamentojn al la ambulanco fronta. Malgraŭ ĉiuj ajn malfacilaĵoj ni plenumos nian taskon!" Kiam la aŭto estis jam preta ekveturi, la politika komisaro Ĉang (張) venis ankoraŭfoje kaj, manpremante kun Vang Huaj-tuo, diris, "Memoru bone, kamarado! La plenaŭto da medikamentoj estas donacitaj al ni de la hungara popolo!" Vang Huaj-tuo nur kappjesis decideme, sin turnis kaj saltis en la veturilon.

En malluma nokto, la aŭto baldaŭ eliris el Pjongjang, kaj kuregis sur la frosta, glita kaj abrupta montaro.

Vang Huaj-tuo kaj korea kamarado Kimĉjo, sidis sultron ĉe ŝultro sur la medikamentkesto, kaj la tranĉe frosta vento pikis iliajn vizaĝojn kiel pinglo, ke glaciĝis sur iliaj brovoj kaj lipharoj. Ili nur povis vidi mallare per siaj okuloj malsekigitaj de la neĝo ke la neĝkovrita vojo rapide glitiĝis malantaŭen sub la aŭto.

La aŭto tre rapide kuris trans la riveron Tedon-Kang, kiu kuŝas inter Pjongjang kaj Seulo. Evakuante el Pjongjang la malamikoj jam detruis la ponton super la rivero. La akvo en la rivero ankoraŭ tumulte fluadas senglacie. La ponto estas neriparebla, ĉar la malamiko bombadas ĝin senĉese por malhelpi nian transportadon; sed niaj batalantoj kun la materialoj sukcesis iel transiri la riveregon dank' al sia saĝo kaj kuraĝo.

Kiam la aŭto transiris Tedon-Kang, estis jam tiel mallume, ke preskaŭ nenio estis videbla. Daŭris la neĝado. Malluma estis la ĉielo, kaj ankaŭ la akvo. Timante ke la aŭto renversigis en la rivero, Vang Huaj-tuo vadis en la akvo kun Kimĉjo por direkti la aŭton sekure transiri la riveregon.

Post la transiro de la aŭto Kimĉjo sveniĝis pro malvarmo. Vang Huaj-tuo kaj la ŝoforo levis lin sur la aŭton, kaj k kovris lin per ĉiuj siaj surtutoj. Dum la aŭto daŭris sian veturadon, Vang Huaj-tuo kuŝis sur la kesto, kaj malfacilege movis siajn kruojn.

Proksime al tagiĝo la aŭto kuregis fluge sub iu montpiedo. Jam ĉesis la neĝo. Sed iliaj surtutoj kaj valitaj pantalonoj kunglaciĝis glacie kun la kesto.

"Ĉu vi ankoraŭ povas persisti?" Vang Huaj-tuo demandis Kimĉjon. "Kaj vi?—Mi estas sama kiel vi!" Kimĉjo diris ridete.

Iom post iom la ĉielo heliĝis, kaj ili decidis halti ĉe iu valetto.

Post malfacila barakto ili sin liberigis de la glacio kaj leviĝis. Desaltinte de la aŭto, Kimĉjo tuj falis sur la teron neĝkovritan kun vekrio. Vang Huaj-tuo ankaŭ ne povis starigi pro krurdoloro, sed li persiste malsupren rampis de la aŭto, kaj diris tuj al la ŝoforo kamuflif* la aŭton por ke ĝi ne estu eltrovita de la aeroplanoj.

Vang Huaj-tuo, penegre ekstaris. Li konsiliĝis kun la ŝoforo pri tio ke la medikamentoj estu kaŝitaj sub la neĝamaso por eviti akcidenton.

Tu Kaŭ (杜高)

Kiam ili estis elaŭtigantaj la kestojn, Kimĉjo ankaŭ leviĝis malgraŭ ĉia malpersvado.

Ili tri tuj movis ĉiujn kestojn en la valetton, kaj bone ilin kaŝis.

Tiam ekaperis subite korea knabino dekdu- aŭ dektri-jara, en blanka jupo, maldika kaj kun kotono volvita sur la piedoj. Tutkorpe tremante de malvarmo, ŝi alvenis kaj demandis kun la okuloj large malfermitaj:

"Ĉinio?"

"Ĉinio, Ĉino!" Vang Huaj-tuo respondis laŭte.

La knabino ridis kaj alpasinte al li silente metis siajn manojn maldikajna sur liajn grandajn genuojn.

"Ĉu vi ne sentas malvarmon?" Vang Huaj-tuo palpis siajn ultrojn en maldika vesto.

Ne komprenante la ĉinan lingvon la knabino nur fikse rigardis per siaj largaj okuloj.

Kimĉjo demandis per la korea lingvo: "Kie estas via patrino?"

"Mi ne scias," ŝi respondis simple kaj en siaj okuloj ekbrilis espero.

"Kio estas ĉi-tio?" ŝi scivoleme montris la du grandajn kestojn apud ŝi.

"Tio estas medikamentoj." La hungara popolo—ĉu vi scias Hungaron?—ili donacis al ni de malproksime. Ili kuracos la vundojn de batalantoj de la Popola Armeo kaj la volontulaj trupoj. Kiam ili estos resanigitaj, ili denove atakos la Usonajn diablojn." Kimĉjo diris al ja knabino.

"Ataki Usonajn diablojn.—ŝi diris kaj pro ĝojo siaj okuloj pleniĝis de farmoj.

Brakumante ŝin al sia sino, Vang Huaj-tuo envolvigis ŝin maldikan korpeton per surtuto, kaj elprenis mangajon el la poŝo, kaj metis ĝin en ŝian buŝon.

Ili rondsidis sur la neĝo. Kimĉjo kantis mallaŭte la "Himnon al Gen. Kim Il-sung," kaj Vang Huaj-tuo ankaŭ jam ellernis kelkajn frazojn el ĝi.

Ĝuste tiam de la alia flanko de la monto du aeroplanoj malalte flugantaj malsuprensturmis al ili, kaj forta vento forblovis la kamuflaĵojn de la aŭto.

"Al la diablo! kiel malalte ili flugas, kvazaŭ preterfrotante la teron!" la ŝoforo diris indigne.

La du aeroplanoj estis cirkle flugantaj.

"Kuŝiĝu rapide!" Vang Huaj-tuo ordonis ilin, kaj ĉiam zorgis pri la medikamentoj kaŝitaj sub la neĝo.

La aeroplanoj ekmaŝinpafadis, kaj la medikamentkesto ekbrulis.

Ekstarante, Vang Huaj-tuo demetis sian surtuton kaj alsaltis al la fajro, kaj laŭte kriegis santepe: "Savon, K-do! Se la medikamentoj estus forbruligitaj, kiel ni povos nin senkulpiĝi al la hungara popolo?"

Kimĉjo kaj la ŝoforo ankaŭ alsaltis spite ĉion. Tiam la knabino subite sin kuŝigis sur la du kestojn apud ŝi vizaĝ-al-tere kaj firme ilin brakumis.



Transporta grupo de ĉina kaj korea popoloj ĝoje revenas plenuminte sian taskon transporti provizojn al la fronto.

Post dek minutoj, la malamikaj aeroplanoj forflugis.

Kiam la kvindek ses kesto, kaj medikamentoj estis sekure reportitaj sur la aŭton, apud la aŭto sur du sendifektaj kesto, kviete kuŝis la kadavreto de la knabino. Sur ŝia dorso estis kvin kuglotruoj, el kiuj fluadis sango, tratremante, ŝian veston, rekte ĝis la kesto. Ŝiaj manoj ankoraŭ firme brakumis la kestojn, kvazaŭ brakumante la popolon hungaran, kaj en ŝia buŝo restis ankoraŭ peco da manĝaĵo nemaĉita....

Vang Huaj-tuo brakumis la knabino per siaj manoj vunditaj.

Ĉinio, Koreio kaj Hungario jam interligiĝis per la sango kaj indigno.

Kiam la medikamentoj sukcese atingis la ambulanco, ĉiuj vunditoj kune kriadis ĉine kaj koree: "Resaniginte, ni mortigos pli multe da Usonaj diabloj por vin rekompenci!"

Eldonigis Ilin

* France, camouflet.

Deklaro de 400 Militkaptitoj

Pli ol 400 Usonaj militkaptitoj ie "Ĉu Ni Povus Esti Aŭdataj?" en kiu kion ili lernis en Koreio kaj kion ili Jen estas la deklaro:

Ni estas Usonaj soldatoj sur Korea tero. En ĉi tiu milito ni lernis kelkajn severajn instruojn kaj sekve volas esprimi kion ni pensas al la hejmlandanoj kaj niaj kamaradoj ankoraŭ militantaj.

Kial ni estis forsenditaj ĉi tien 5,000 marajn mejlojn trans la oceano por batali en milito kiu koncernas nek nin mem nek niajn karulojn, ignorante la rajtojn de la peneme laboranta popolo de ĉi tiu nacio kiu suferis tiel multe? Koreio ja neniam malutilis aŭ minacis nian landon aŭ iun ajn alian nacian.

Oni diris al ni ke tio estas polica agado. Tamen kia tio fariĝis? Kaj kiel tio finiĝos?

Tio alportis ruiniĝon al lando kiu estis sin rekonstruanta post jaroj de subpremado. Ni vidis la efikojn de sendistinga bombado al urboj kaj vilaĝoj. Ni vidis civitanojn mortigitaj, senhejmajn kaj malsatajn virinojn kaj geknabojn piedirantaj la vojon, rifuĝantojn en sia patrolando. Ni vidis niajn batakamaradojn mortantaj sur la batakampo kaj en la neĝo kaj glacio, ĉe sen taŭgaj vestaĵoj kontraŭ tia klimato kaj sen deca enterigo. Kia polica agado estas tio kio detruas landon anstataŭ ĝin protekti?

Ni hontas pro la parto kiun ni usonanoj ludas en ĉi tiu sensenca

en Norda Koreio deklaris sub la titolo ili petegis al la usonanoj, ke ili aŭdu volas koncerne la militon en Koreio.

milito. Tio simple alportas malamon kaj malestimon por ni inter la popoloj de Azio. Forviŝi la makulon de nia agado bezonas multajn jarojn. Rekonstrui en Koreio kion ni kaj la aliaj trupoj detruis en ĉi tiuj kelkaj monatoj ankaŭ bezonas multajn jarojn. Ni akre sentas nian kolektivan respondecon por la tuta suferado kaŭzita.

Por la grandaj firmaoj, milito signifas profitojn el aeroplanoj, tanĝoj, kontraktoj por militistaj vestaĵoj, papiloj, municio kaj aliaj materialoj. Por ni soldatoj, ĝi signifas mizeron, dezertecon, kaj perdon de vivo, kaj por la hejmlandanoj ĝi signifas rompiĝon de la familio, pezajn impostojn kaj vivmalfacilecon.

Ni nun travidas la trompon de ĉi tiu "polica agado." Ni speciale sentas abomenon kontraŭ la ordono transpasi la 38an paralelon kaj la vanaj promesoj ke ni estos hejme unue je Didankado kaj poste je Kristnasko.

Ni povas kompreni kial la ĉina popolo venis al la helpo de iliaj najbaroj, la koreoj. Kiam ni antaŭen puŝigis ĝis la Jalu-Rivero, ilia sekureco estis minacata pro la alesto de la Usona eskadro en la Formosaj maroj. La ĉinoj estas granda popolo. Ili estas ĉiam niaj amikoj. Ili estas batalantaj por justa kaŭzo.

Ni devas neniam esti ŝovintaj niajn

nazojn en la aferon ĉi tiean. Ni havis nian propran Civilan Militon kaj estus indignintaj kontraŭ iu ajn intervenanta lando. Ni estas pacamanta popolo, ni volas defendi niajn proprajn hejmojn per la pleja kosto, sed ni indignas esti uzitaj por kaŭzo kia ĉi tio. Rilate al kelkaj de la falsaj rakontoj disfamigataj ĉie pri la malĝentila traktado al niaj kunuloj fare de la Popola Armeo, ni havas la jenon por diri: Ekde nia kaptiteco ni ricevas la plej bonan traktadon de la ĉinoj kaj koreoj. Ni ricevas la plej bonan medicinan prizorgon akireblan. Kaj la saman bonan traktadon kiel iu ajn alia aŭ ili mem. Ĉia klopodo estas farata por nia bonstato.

Ni postulas:

1. Eltiru la Usonan kaj ĉiujn alilandajn trupojn kaj lasu Koreion al la Korea popolo. Haltigu ĉi tiun stultan bataladon. Savu pliajn vivojn de usonanoj, ĉinoj kaj koreoj. Ni restarigu pacon en la mondo.

2. Permesu novan Ĉinion okupi sian laŭlegan pozicion en la Unuigitaj Nacioj. Nia lando devas rekoni la novan Ĉinion. Ĝi estas granda nacio. Ni nepre retiru la 7an Eskadron for de la ĉinaj maroj por eviti pluan konflikton.

3. Ni apelacias ke io estu senprokraste farita por ke Usonaj vivoj estu ne plu perditaj. Ĉesigu ĉi tiun sensencan sangnan militon. Ni postulas pacan solvon nun. Lasu nin kiel eble plej frue reveni al nia propra hejmo.

Esperantigis Nojo Lo

Fama Sciencisto Persekutata de Usonaj Imperiistoj

Po Ŝeng (柏生)

Nia fama atomfizikisto Profesoro Ĉau Ĉung-ĵau (趙忠堯), studinta en Usono kaj profunde prizorgita de la ĉina popolo, jam revenis Pekinon la 17an de januaro. Sur la vojo de reveno al la patrolando, li estis diversmaniere persekutata kaj senkaŭze enkarcerigita 47 tagojn de Usonaj imperiistoj kiam li trapasis Japanion.

Printempe 1946 j., Prof. Ĉau iris al Usono por ĉeesti la eksperimentadon de atombombo en Insulo Bikini. Li faris pure sciencajn esploradojn pri atomfiziko sinsekve en Massachusetts Kolegio de Natura Scienco kaj Inĝenierado, Carnegie Kolegio de Vaŝingtono kaj Kalifornia Kolegio de Natura Scienco kaj Inĝenierado. Kiam li estis en la lasta kolegio lastan marton kaj komencis prepari reveni kaj servi al la popola patrolando, la spionoj de la Federa Buroo de Esploro observis sekrete lian agadon. Iu sugestie diris al li: "Estas pli bone ke vi ne reiru al via lando, por eviti malagrabajn." Sed Prof. Ĉau estas sciencisto patrolandon amanta kaj nenia persekuto povis ŝanceli lian decidon reveni al la patrolando. La 28an de aŭgusto lastjare, ricevinte la paspermesilon de Hongkong-Registaro, li suriris la vaporsipon "Prezidanto Wilson" kaj kune kun pli ol 120 studentoj studintaj en Usono eksciigis ekveturis returnen al la patrolando. Sed venis tuj spionoj de la Federa Buroo de Esploro, kiuj multfoje pridemandis lin, priserĉis lin kaj pretekstante serĉi kontraŭlegan eksportadon de tenis ĉiujn liajn librojn pri fiziko kaj la gravajn notlibrojn pri atomfiziko.

Frumatene, la 12an de lasta septembro, kiam la vaporsipo "Prezidanto Wilson" atingis Jokohama, tuj Prof. Ĉau estis perforte pridemandata de la funkciuloj de Jokohama Informoficejo de la Ĉefstabejo de la Okupanta Armeo de Usonaj imperiistoj, kaj tiuokte, Prof. Ĉau kaj Luo Ŝe-ĵun (羅時鈞) kaj Ŝen Ŝanĵung (沈善炯), la du diplomatoj de Kalifornia Kolegio de Natura Scienco kaj Inĝenierado, estis arestitaj kaj eskortitaj per veturilo por malliberuloj al Nakano-a Usona Armea Malliberejo en Tokio kaj la funkciuloj diris al ili: "Vi ja komprenas kial ni speciale arestis tiujn el Kalifornia Kolegio de Natura Scienco kaj Inĝenierado!" Kaj ili aldiris: "La fama ĉina aŭtoritato de aviado Prof. Ĉian Ŝue-ŝen (錢學森) jam estas arestita en Usono." En antaŭtagmezo sekvanta, la Usonaj spionoj katenis ilin kaj sendis ilin al Sukamo, Malliberejo en Tokio, enkarceriganta japanajn militkrimulojn. Ili estis devigitaj surmeti malliberulajn vestojn kun ses P'j kaj enfermitaj aparte en tri karcerojn: Prof. Ĉau en N-ro 18, Ŝen en N-ro 19 kaj Luo en N-ro 40. Ili travivadis tute malhoman vivon kiel aliaj preskaŭ tricent ĉinaj malliberuloj enkarcerigitaj en tiu malliberejo. Ili kun neesprimebla indigno kelkfoje postulis tujan disponon, sed la Usonaj imperiistoj foje kaj refoje prokrastis. Iu spiono de Usona Informoficejo en Tokio, diris al ili:



Prof. Ĉau Ĉung-ĵau

"Ni ricevis el Los Angeles telegrafon de La Sesa Korpuso de Usona Armeo. Ni nur plenumas la ordonon de Vaŝingtono kaj havas nenian rajton ion disponi." Sed samtempe Prof. Ĉau vidis per siaj propraj okuloj ke la japanaj militkrimuloj estas unu post alia elkarcerigitaj de Usona Okupanta Armeo.

Dum 47 tagoj da mallibereja vivo, la plej abomeninda por ili estis la "delegitaro" de Ĉiang Kaj-ŝek-banditaro en Japanio. Ĉi tiuj filhomoj ŝajnigante sin "zorgemaj" pri ili, kelkfoje persvadis kaj minacis ilin dirante: "La Usona Registaro konsideras vian kazon tre grava, sed se vi volus iri al Tajvan, la afero fariĝus facila." Sed Prof. Ĉau respondis senhezite: "Iron al Tajvan ni absolute ne volas konsideri. Ni decidis reveni al libera Ĉinio!"

La 28an de oktobro, la Usonaj spionoj sciigis ilin ke ili jam povas elkarceriĝi, sed tuj ilin alsendis al la "delegitaro" de Ĉiang Kaj-ŝek-banditaro en Japanio, kie ilin kaŝob-servis spionoj. La "delegitaro" ankoraŭ esperis ilin persvadi ke ili iru al Tajvan, sed ĉi tiu persvadaĉo estis decide rifuzita de ili.

Ĝis la 15a de novembro ili, akiris liberon, kaj ili transloĝis en Jajuen-Hotelon. Tiam ili legis en iu multobligita Popola ĵurnalo de Elmigrintaj Ĉinoj, ke la scienco rondo de la patrolando indigne protestas kontraŭ la senkaŭza persekutado de ili suferata kaj ili sentis senliman ekscitigon kaj konsolon ke ili, des pli sopiris rapidege reveni al sia granda popola patrolando. Post kvin tagoj, ili iris for de Jokohama.

Sed en Hongkong la 27an de nov. ili ree estis senkaŭze kaŝobservataj tutan nokton de anglaj policanoj. En la 28a ili finfine revenis al sia libera patrolando.

Kiam Prof. Ĉau trapasis Kantonon, Ŝanhajon kaj Nankinon, li ricevis entuziasman bonvenigon de la popolamosoj. Li diris ke li partoprenos laboron en la Instituto de Moderna Fiziko de la Ĉina Sciencia Akademio, kaj kune kun aliaj sciencistoj penegas por meti la bazon por esplorlaborado pri atomscienco en nova Ĉinio.

KOOPERATIVO EN NOVA ĈINIO

Post kiam la ĉina popolo gajnis landskale la militon de liberigo, la kooperativa movado en nova Ĉinio disvastiĝas kun mirinda rapideco. Inter marto, 1949 (tiam la membroj atingis 5,000,000) kaj junio, 1950, la membroj de kooperativoj plimultiĝis kvinoble. La sekvanta tabelo montras la kreskon de post decembro, 1949.

	membroj	kooperativoj	kapitalo de akcioj (mil. juanoj)
dec. 1949	13,446,887	26,309	122,398,110
mar. 1950	20,176,448	38,648	239,743,440
jun. 1950	23,921,909	42,850	268,463,180

Kampanaraj Membroj.

Plejparto de la kooperativanoj estas liberigitaj kampanaroj, kiuj ricevis teron en la agrara reformo. Tial pli ol 93 procentoj de la membroj estas en Nordorienta, Norda kaj Orienta Ĉinio. Sole en Nordorienta Ĉinio, laŭ nekompleta statistiko, dum 1950, pli ol 10,000 kooperativoj vendis komercaĵojn valorantajn je 2,200,000 tunoj da greno, aŭ proksimume kvaronon de la tuta kvanto de podetala vendo en tiu regiono. Kooperativoj de konsumantoj en Mukden, Pekino, Ŝanhajo, Hankou kaj aliaj urboj, provizas al kelkaj milionoj da laboristoj, registaraj oficistoj, instruistoj kaj studentoj, kaj kreskanta nombro da kooperativoj de produktantoj estas organizataj.


Unu el la ĉefaj funkcioj de kooperativoj nun estas helpi disvolvi novtipan komercan reton, kiu minimumigas la profiton de perantoj kaj protektas la profitojn de ambaŭ konsumantoj kaj malgrandaj produktantoj. Alia funkcio estas organizi la disajn individuajn malgrandajn produktantojn kaj plifortigi la interligon inter ili kaj la ŝtata ekonomio. Ĉi lasta estas speciale grava, ĉar la individuaj malgrandaj produktantoj formas grandan parton de la 475 milionoj da ĉinaj popoloj, kaj estas respondecaj al ĉirkaŭ 90 procentoj de la nacia ekonomio.

La Komuna Programo kaj Kooperativoj.

La Komuna programo akceptita de la Popola Politika Konsiliga Konferenco garantias ŝtatan helpon al la kooperativa movado kaj skizas ĝian disvolvigon. Tial, artikolo 26 emfazas la gravecon de efektiveco de "divido kaj kunordigo de laboro de ĉiuj komponantoj de la socia ekonomio sub la gvido de la ŝtata ekonomio, ke tiu komponanto ludu sian rolon en la disvolvo de la tuta socia ekonomio" dum artikoloj 29 kaj 38 pli specife traktas pri la kooperativoj. Artikolo 29 legiĝas:

"Kooperativa ekonomio estas duon-socialisma en naturo kaj estas grava komponanto de la tuta popola ekonomio. La Popola Registaro devas helpi ĝian disvolvigon kaj doni al ĝi favoran traktadon."

Artikolo 38, difinanta la amplekson kaj tipojn de kooperativoj, legiĝas: "Kooperativoj: la grandaj amasoj de laboranta popolo devas esti kuragigitaj kaj helpataj disvolvi kooperativojn, laŭ la principo de volonteco. Provizaj kaj vendantaj kooperativoj, kooperativoj de konsumantoj, de kredito, de produktantoj, kaj de transporto devas esti unue organizitaj en urboj kaj vilaĝoj. Kooperativoj de konsumantoj estos unue organizitaj en fabrikoj, institucioj kaj lernejoj."



HOWENS

Vilaga Kooperativo

Su Ĉian

Prof. Ĉau preparolis kun senlima ekscitigo kaj goĝejo siajn sentojn kaj impreson de post sia reveno al la patrolando. Li diris ke la plej kortuŝa afero estas tio ke ĉie ajn li ricevas varmegan bonvenigon kaj intiman konsolon de la popolo. Kaj li vidis la entuziasman servon kaj la unuigon de la popolo de la nuntempa patrolando, kaj ĉie ajn esprimatajn grandajn naciajn memrespekton kaj memfidon, kiujn li neniam vidis pasintempe. Li vidis ke la sciencistoj de la nuntempa patrolando, ĉiuj tiel entuziasmoplene laboras, lernas kaj libere studas kaj ĉiuj sin okupas je efektivaj konstruadoj sub la gvidado kaj helpado de la popola registaro, kaj tion ĉi li kom-

paras kun la persekutado fare de la Usona Registaro al la progresemaj sciencistoj, kiun li mem vidis en Usono dum kvar jaroj. Ekzemple, pli ol cent profesoroj kaj instruistoj tuj estis eksigitaj nur pro tio ke ili ne partoprenis la juron por deklari sin ne kompartiano. Mondkonata sciencisto A. Einstein estis avertita de la Usona Registaro pro tio ke li subtenas la mondpacon. Kaj tiuj progresemaj sciencistoj, kiuj estis devigitaj partopreni en la esplorado pri ŝtatefenda scienco, ĉiuj perdis sian liberon. Vidinte tian kontraston li sentas des pli profunde senliman amon kaj esperon al la patrolando.

Esperantigis Jang Theing



Muelado

lignogravuraĵo de Ma Ta

VIRINOJ LIBERIGITAJ EL LA MALFELIĈO

"Post la liberigo, mi ĉirkaŭrigardis kaj vidis ke ĉiu estas gaja escepte min mem," diris al mi Ĉeng Su-ĉen (程素真), juna laboristino en teksejo, kiam mi demandis ŝin pri siaj spertoj en ŝia malnovstila geedziga vivo.

Kiam ŝi estis devigita edziniĝi en la aĝo de 18 jaroj, ŝi ne sciis ke ŝia edzo jam havis edzinon. Ŝi daŭrigis sian laboron en la teksejo kaj suferis konstantan malbontraktadon de sia edzo kiu enposigis ĉiom da siaj enspezoj kaj post nelonge prenis trian edzinon. Malgraŭ du gravediĝoj, ŝi nek povis ĉesigi la laboron en la fabriko, nek estis permesata de li havi ian ajn ekstran nutraĵon.

"Kiam ŝanhajo estis liberigita," ŝi diris, "kaj nia fabriko estis transprenita de la registaro, mi ne povis antaŭvidi kiel ĝi min helpos. Mi ne vidis klare la vojon antaŭ mi. Sed baldaŭ mi rimarkis kiel kompleksaj kaj helpemaj la organizantoj de nia virina sindikato estas, kaj decidis peti ilian helpon por la bono de miaj infanoj. Ili alparolis mian edzon, sed li estis fiera kaj ne volis ilin aŭskulti. Tial kiam la Nova Geedziga Leĝo estis publikigita, ili helpis min procesi al la popola tribunalo, kaj mi akiris mian liberecon. Miaj infanoj estas kun mi, kaj li devas pagi por ilia vivtenado. Ĉar miaj propraj enspezoj estas bonaj, mi povas dungi vartistinon por ilin prizorgi dum mi estas en la laborejo. Ni ĉiuj estas feliĉaj nun."

La kazo de Ĉeng Su-ĉen estas similaj al multaj miloj da aliaj. Tuj post la liberigo virinoj trovis sin ankoraŭ ligitaj de geedzigoj kontraktitaj sub la feŭdaj geedzigaĵoj de malnova Ĉinio, sed nun ili estas emancipitaj dank' al la Nova Geedziga Leĝo proklamita lastan majon.

Laŭ la principo de egaleco por virinoj difinita en la Komuna Programo de la Ĉina Popola Politika Konsilia Konferenco, la leĝo kompletigas la ekonomiajn, politikajn kaj kulturajn rajtojn de virinoj, kiuj estas nuntempe efektivegataj ĉiufanke.

En urboj kaj vilaĝoj tra la tuta lando, sed precipe en la pli postĝintaj kamparaj regionoj, kie regis analfabeteco kaj feŭda superstiĉo en la tempo de liberigo, estas necese fari propagandon kaj zorgeman klarigon pri la nova leĝo. Ĉi tiun

laboron prenas sur sin la membroj de la Federacio de Demokrataj Virinoj, kiuj kunlaboras kun la lokaj organizaĵoj kaj la lokaj popolaj tribunaloj.

Miloj da kazoj estas al ili alportitaj por konsilo kaj gvido, kaj multaj estas fine solvitaj sen proceso en la tribunalo. En ŝanhajo, el la 1,522 tiaj kazoj, pli ol duono estas pace solvitaj kaj harmonio, reakirita ekster la ĵuĝejo.

Geedzigaĵaj malpacoj devenantaj de la feŭda geedziga sistemo estas ofte ne facile solveblaj, ĉar ne nur la edzo, edzino, kaj infanoj estas implikitaj, sed kelkfoje ankaŭ aliaj. Ekzemple kiam la edzo havas pli ol unu edzinon, ankaŭ interesoj de tiu edzino devas esti konsiderataj kaj en multaj kazoj de malbontraktado implikiĝas la familianoj de la edzo eĉ pli multe ol la edzo mem.

En la kamparaj regionoj, liberigon ekpostulas la viktimoj de la kruela "infan-geedziga" sistemo, kiuj estis venditaj en junaĝo aŭ kelkfoje eĉ en infanaĝo al aliaj familio kiel estonta edzino por ilia filo, kaj de tiam komencis vivi en senkaŝa sklaveco. Kelkaj el ili estis venditaj multajn jarojn antaŭe al familioj kie la filo ankoraŭ ne naskiĝis, kaj estis devigataj atendi en la aĝo de 20-jara la naskiĝo de ilia estonta edzo.

Vidvinoj, kiuj ne rajtis reedziniĝi sub la malnova sistemo nun rajtas denove edziniĝi. Multaj knabinoj kiuj estis devigitaj aŭ venditaj en prostituadon aŭ konkubinecon povas nun postuli sian liberecon.

Estas neniom mirinde ke la nova leĝo, tuj kiam ĝiaj signifoj estas plene komprenitaj, ricevas entuziasman bonvenigon inter la virinoj de Ĉinio. Rakontoj post rakontoj al mi diritaj atestas ke la suferado, kiuj estas jam mildigitaj kaj malebligataj por la estonteco estas ja ne kalkulebla.

Vang Lan (王蘭) 24-jara fabrik-laboristino en ŝanhajo, priskribis al mi siajn travivaĵojn kiel infan-edzino. Vendite infanaĝe al la familio de sia estonta edzo, ŝi havis nekredeble mizeran kaj ekspluatatan vivon. Ŝi devis labori ĉiutage en la fabriko, sed la bopatrino konfiskis ĉiom da siaj laborpagoj. Ŝiaj hejmaj devoj ampleksis kuiradon, purigadon, kaj vest-lavadon por la

ARDE MI AMAS LA NOVAN PEKINON

Laŭ Se (老舍)

La aŭtoro estas fama verkisto, kiu lasttempe verkis la teatraĵojn "Fang Ĉen-ĉu (方珍珠) kaj "Drakliphara Kanalo" (龍鬚溝). La unua priskribas la liberigon de tambur-kantistino kaj la dua la vivon de la loĝantoj apud la Drakliphara Kanalo menciita en jena artikolo.

Bela estas Pekino. Mi estas certa pri tio, ĉar mi ne nur estas pekinano, sed mi ankaŭ vizitis ambaŭ Eŭropon kaj Amerikon kaj multajn el la famaj urboj okcidentaj mi, vidis. Se mi ĝin laŭdis kiel simpla pekinano, mi riskus je antaŭjuĝo.

Mi kónas la belecon de Pekino, mi ĝin amas kiel mian patrino. Kaj el tia granda amo mi sekve maltrankvilis kaj ĉagreniĝis pro ĝiaj mankoj. Mi maltrankvilis pro ĝiaj mankoj ĝuste kiel pro la malsano de iu karulo. Jes, Pekino havis siajn mankojn, la mankojn alportitajn de la estintaj imperiestroj, militaristoj kaj la Kuomintanga registaro, kiuj okupadis Pekinon kaj ankaŭ aĉe ĝin traktadis.

En la pasinto, ekzemple, kiam la imperiestro aŭ Ĉiang Kaj-ŝek eliris, la stratoj estis purigitaj kaj priaspergitaj. Sed kie iliaj palankeno aŭ aŭto ne trapasis, neniam vidigis balailo kaj sitelo. La nobeloj kaj altrunguloj loĝis en domoj palacosimilaj kun bela florigardeno, dum la malriĉuloj loĝis en la plej malpuraj svarme loĝataj domoĉoj. La nobeloj kaj altrunguloj havis antaŭ siaj pordoj bitumpavimon por ke iliaj

aŭtoj rapidu glite, dum la malriĉuloj havis antaŭ siaj pordoj nur amasojn de balaĵoj.

Je la fino de 1949 mi revenis al mia naskiĝurbo Pekino. Jam 14 jarojn mi ĝin ne vidis. Kvankam tiel longe mi forestis de ĝi, tamen neniu tagon mi ne sopiradis pri ĝi. Le ajn mi estis, mi prenadis ankoraŭ Pekinon kiel la fonon de miaj noveletoj, ĉar ekfermitaj la okulojn mi povas vidi Pekinon en mia memoro pli intima, pli reala kaj pli sentriĉa ol la aliaj urboj antaŭ miaj okuloj. Nur veron mi diras.

Ĝis hodiaŭ mi loĝadas en Pekino jam ree unu jaron. En tiu ĉi plena jaro, ĉio, kion mi vidis kaj aŭdis, pruvas, ke la nova registaro estas vere de la popolo kaj por la popolo je ĉiu flanko. Sole la konstruado jam povas doni sufiĉe da pruvoj. Nu, ni menciuj kelkajn el ili:

1) La Subteraj Kloakoj:

La subteraj kloakoj de Pekino jam estis longe neglektitaj. Ĉiufoje, kiam pluvegis, tuj pruvigis la vero en la moka diro: "Pekino—incensujo kiam ventas kaj inkujo kiam pluvas." Tuj post sia fondaĵo la Pekina Popola



Tian-an-men (Pordego Ĉielpaco) antaŭ la Imperia Palaco en Pekino

tuta familio. Eĉ la plej eta prokrasto aŭ eraro en kuirado kutime kaŭzis severan batadon kiu preskaŭ fariĝis ĉiutaga okazaĵo. Ŝia manĝaĵo konsistis nur el rizsupo kaj salitaj legomoj, kaj por vestaĵo ŝi devis porti la eluzitajn forĵetitajn ĉifonojn de la ceteraj membroj de la familio.

"Eĉ post la liberigo," ŝi diris, "mi ne kuraĝis diri al iu ajn pro la timo de plua batado". Ŝia parolo ĉesis pro singultado kaj la organizanto de la sindikato daŭrigis sian rakonton. "Ni trovis ŝin ploranta, kaj en la komenco ŝi volis diri al ni nenion. Sed finfine ŝi rakontis al ni kaj ni

vizitis sian edzon kaj lian familion. Post diskuto ili promesis reĝustigi la aferon. Sed tuj en la sekvanta semajno ili batis ŝin denove. Post du pliaj avertoj ni ne povis ne submeti la proceson al la popola tribunalo, kie ŝi akiris sian ekstedziniĝon."

Rememorante siajn pasintajn suferojn, Vang Lan ankoraŭ tremis pro emocio, sed ŝi turnis al ni kun rideto. "Nun mi estas liberigita el ĉio ĉi tio kaj povas havi miajn proprajn amikojn," ŝi diris. "Por mi, nova vivo jam komenciĝas."

Ci-pao Nin

Registaro jam decidis forigi tiun ĉi makulon postlasitan de la reakcia registaro: ripari la vojojn kaj elfosi la malpurajn el la kloakoj. Mi scias, ke la financo de la registaro ne estas sen malfacilo, kiam pezega rekonstrua tasko atendas post dekkelk-jara kontraŭjapana kaj liberiga militado. Tamen por la bono de la popolo la registaro ne prokrastis tiun gravan taskon pro financa malfacilo. La kloakoj de diversaj kvartaloj estis refositaj kaj nun la pluvakvo kaj malkura akvo trovas forfluejon. Pekino ne plu ĝenas dum pluvo; la vojoj ne plu inkujigas kiam pluvigas.

Kio min plej kortuŝis estas tio, ke la por-popola registaro konstruis kloakojn ne nur por la ĉefstratoj, sed unue ĝi zorgis pri la malfrekventataj lokoj, kiujn la reakcia registaro neniam priatentis. Antaŭe la reakcia registaro sukadis la sangon de la popolo kaj forverŝadis malpurajn akvon kaj forjetatajn antaŭ la pordon de la malriĉuloj, ke ili "ĝuu" la vivon de porko kaj hundo. Sed nun la popola registaro komencis la kloakriparon en lokoj plej malpuraj kaj plej malsanoplenaj; ĝi direktas siajn okulojn al la malriĉaj popolanoj.

En la suda kvartalo de Pekino sin trovis nekovrita kloako nomita "Drakliphara Kanalo". "Drakliphara Kanalo", nomo kiel bela! Sed fakte plej naŭza kloako ĝi estis. Ambaŭ flanke de ĝi svarme loĝas laborantaj popolanoj, kiuj devis spiradi en tia naŭza haladzo. Tre multajn jarojn ĝi estis neglektita, ĉar ĝi troviĝis en la malriĉula kvartalo. La loĝantoj plurfoje volonte monferis por ĝin ripari, sed la kontribuitaj monsumoj estis forglutitaj de la reakciaj regantoj. Komence de la lasta somero la popola registaro ekkonstruis subteran kloakon apud la kloako nekovrita. En la aŭtuno la konstruado finiĝis kaj la kloako nekovrita estis plenigita per tero. Estas imageble, kiel kore dankas la popolo.

2) Sanitaraj Aferoj; Pekino estas ĉiam bela, tamen sub la regado de la reakcia registaro ĝi ne estis ĉie pura. Jes, la loĝantoj tiam ja regule pagadis sian sanitaran imposton, sed pro la korupteco kaj senrespondeco de la regantoj, la sanitara imposto ne estis nepre elspezita por sanitara aferoj. Pekino estas nun kvazaŭ bela antikva kesto gravurita kaj lakita, kies ĉiu kaveto aŭ suiketo estas bone purigita kaj polurigita kiam ĝi estas metita sub la zorgo de diligentulo. Estas vere, ke ĉiu strato de Pekino nun aspektas pura kaj freŝa. Balaajo ne troviĝas ĉe interne de la kortoj de la loĝejoj, ĉar la balaaj-transportistoj estas tiel

Nova Almanako Anstataŭ La Malnova

La plej vaste vendita libro en Ĉinio dum la pasintaj mil jaroj estis malgranda, broŝur-forma "Imperia Almanako"—kalendario arangita laŭ ambaŭ la suna kaj la luna sistemoj. Ĝi estis la unua objekto aĉetita de la kamparanoj por la Novjara Festo. Ĝi estis pendita surmure ĉe la plej okulfrapa loko, kaj ekde tiam ĝi fariĝis gvidilo por ĉiaj agadoj de la kamparana familio, ĉu plantado, geedzigo aŭ enterigo de mortinto.

La almanako de malpli ol 50 paĝoj estis dividita en du partojn. La unua estis la antaŭparolo—prikribante la tutjaran rondiradon de naturo, rakonto bazita sur feŭdaj superstiĉoj kaj maljunulinaj legendoj. Se estis demando: "Ĉu troviĝos sufiĉa pluvo ĉijare?" la almanako estis tuj konsultita. Familiara bildo de drako portis profeton pri la pluvokvanto dum la jaro. Estis ankoraŭ aliaj bildoj de spiritoj, dioj kaj diinoj kiuj kontrolis ĉies destinon. Se ju malsaniĝis, li konsultis la almanakon por konsilo koncerne la alpreĝota dio. Estis paĝoj da klarigoj pri la signoj de la zodiako kaj la korespondaj bestoj (ĉiu homo supoze rilatiĝis kun certa besto-formo), kaj la signifoj kaj interrilatoj de la planedoj kaj bestoj. Tiu ĉi sekcio estis zorgeme konsultita en problemoj pri geedzigo. Neniu kuraĝis malobei tabuojn de la almanako, kiu, ekz., malpermesis "Tigran" viron geedziĝi kun "safa" virino. Milionoj da junaj geamantoj naskitaj sub tiaj fatalaj signoj estis devigataj forlasi siajn romanajojn kaj feliĉon sub ordo de la "dioj."

Jen estis la ormoneraj profetaĵoj. Ses moneroj kun malsamaj desegnoj sur ambaŭ flankoj povas esti kombinitaj en 64 diversaj manieroj, kaj la almanako donas klarigojn por ĉiu kombino. La kamparanoj provis eltrovi sian sorton per turnigo de la moneroj.

La dua parto de la almanako tabeligis la 24 tempodividojn kaj la iradon de la sezonoj. Sub ĉiu dato estis klarigo kiel: "Hodiaŭ estas favore por hartonado sed ne por transiro de rivero" aŭ "Hodiaŭ estas favore por sinbano sed ne por vizito," kaj la kamparanoj antaŭe kutime direktis siajn vivojn laŭ tiuj admono.

diligentaj kaj akurataj, ke oni volonte forportigas potage la balaajojn en kaj ekster sia korto. Beleco ja estas ne apartigebla for de pureco. Antaŭe mi estis jam fiero sole pro la beleco de Pekino, nun mi povas fieri ankoraŭ pli: Jen, ankaŭ kiel puĝa kaj agrabla la popola antikva urbo aspektas! Estas imageble ke post dek aŭ ok jaroj la tuta Pekino certe fariĝos granda parko, ĉie bela kaj ĉie pura, kaj en kiu ĉie troviĝos antikvaj vidindaĵoj kaj ĉie troviĝos ankaŭ la plej novaj sanitaraĵoj.

3) Elektro kaj Akvo: Pekino estis ofte malluma dum nokto antaŭ la liberigo. Kvankam elektrolampojn ĝi havis,

La Imperia Almanako fariĝis skurĝo por la kamparanoj, kaj rezulte de tio, milionoj estis tenataj en subigo kaj efektive mortigitaj per feŭdaj superstiĉoj. Tial, la Popola Registaro tre frue preparis ĝian reformon. Sed tiaj antikvaj superstiĉoj ne facile mortas. La unua reformita almanako estis publikigita en 1940 en la Malnovaj Liberigitaj Regionoj. Ĝi, tamen, ne konformis al la bezonoj de la kamparanoj. Ili rifuzis ĝin senhezite. Ili preferis la malnovan bildoplenan almanakon. Ili serĉe nomis la novmodan objekton, "la fremdula almanako" servis kiel moknomo por iuj ajn sentaŭguloj. La malnova almanako restis neanstataŭita.

Poste, en marto, 1950, laŭ la propono de la Pekina Esplora Societo por Popularaj Verkoj, la bonkonata novelisto Ĉaŭ Ŝu-li (趙樹里) kaj la papulara verkisto Miaŭ Pej-se (苗培時) prenis sur sin la taskon de reformo de la Imperia Almanako. Unue ili diskutis la problemon kun la malnovaj presejoj kiuj samtempe estis ĝiaj redaktoroj kaj eldonistoj kaj provis konvinki ilin ke la reformo pliigos la popularecon kaj utilecon de ilia eldonaĵo. Kun ilia helpo, post sep monatoj da preparo, la reformita "Novĉina Agrikultura Almanako" aperis lastan oktobron.

Tiu nova Almanako, en la malnovstila kovro, aspektas ĝuste same kiel la malnova. Nek la formato nek la plano estas ŝanĝita. Sed anstataŭ superstiĉoj, la unua parto de la broŝuro donas ĉiujn specojn da interesej kaj utilaj scioj, koncerne la ĉiutagan vivon de la popolo kaj kamparan laboron. Pentraĵo pri homoj laborantaj por akvokonservado anstataŭas vetero-drakojn. Centoj da popularaj diroj pri agrikulturo estas kompilitaj kun novaj edukaj signifoj. La nova Geedziga Leĝo estas presita komplete kun klarigoj en bildoj. Nun, kiam kamparano trovas, ke lia besto malsaniĝas, li povas trovi en sia nova almanako dek paĝojn da konsilo

tamen ilia lumo estis tiel malforta, ke ili apenaŭ briletis. Kaj krome la elektroprovizado ofte interrompiĝis. La mallumo politika mallumigis ankaŭ la elektrolampojn. Tiam ankaŭ la akvoprovizo estis tia. En la somero, kiam la akvofontoj elĉerpigis, tiam ĉesis ankaŭ la akvoprovizado. Eĉ dum la cetera tempo nur la influhavantoj povis uzi akvon laŭplaĉe, ĉar en la kvartaloj de la malriĉaj loĝantoj la akvokonduka sistemo absolute ne etendis siajn akvotubojn. La malriĉuloj devis ĉerpi akvon el putoj. Sub la regado de la reakcia registaro la provizado de elektro kaj akvo de la septcentjara antikva urbo restis kvazaŭ en la stato antaŭ sep jarcentoj.

Post la liberigo de Pekino, la koroj kaj la okuloj de la loĝantoj samtempe vidas lumon. La elektrolampoj de Pekino fariĝis veraj elektrolampoj dank' al la nova administrado de la elektrejo kaj la progresado kaj penado de la labo-




Kovrilo de la nova almanako

pri kuraco de diversaj bestomalsanoj. Se li deziras skribi leteron, li scias kie li povos trovi helpon, ĉar estas multaj ekzemploj de leteroj en sia almanako. La "ormoneraj profetaĵoj" ankoraŭ restas, sed rimversoj reflektantaj la novan vidpunkton pri vivo anstataŭas antaŭdirojn pri sorto.

La kalendara sekcio havas siajn 24 tempodividojn kiel antaŭe, sed la novaj komentarioj donas utilajn sciojn. Citante el la nove publikigita libreto de la Agrikultura ministerio, **Kion fari sur la kampoj?** la kalendario markas ĉiun daton kun komento kiel: "Hodiaŭ estas taŭge por planti brasikon" aŭ "taŭge por sarkado" k.t.p. Ambaŭ almanakoj donas instrukcion en alloga prezentado. Sed la nova surbaziĝas sur fakto dum la malnova sur fikcio.

Semajnoj antaŭ la Ĉina Luna Novjaro 640,000 ekzempleroj de la nova almanako estis forvenditaj sole en Norda Ĉinio. Podetalaĵ vendistoj reveninte el vilaĝoj raportis pri kreskanta kvanto de vendado. Ĉaŭ Ŝu-li kaj Miaŭ Pej-se estas goĝaj. Ilia nova tasko estas sukeese plenumita. Milionoj da kamparanoj liberigos el pereigaj restaĵoj de feŭda penso. Censinio



La kurba koridoro ĉe la "Nord-mar" en Pekino

Ku Ju (谷峪)

NE DOLĈAS MELONO DESIRITA PERFORTE

(Daŭrigo)

IV

Tuj post vesperiĝo, kiam Jungĉjo kaj liaj patrino kaj edzino estis ĉetoble, la prezidanto de la virina asocio venis sondi la opinion de lia patrino. Ŝi apenaŭ levis la porkurtenon. Zuenjo (尊兒), la edzino de Jungĉjo, tuj komprenis, ĉar ili jam interparolis plurfoje. Ŝi forigis kviete la mangilaron kaj metis ĝin apuden. Post kelkaj frazoj de kutima babilado, la prezidanto de la virina asocio demandis kvazaŭ hazarde:

"Kiel status post ol vi prenis bofilinon?"

"Ha, mi dankas vin pro via zorgo. Ni ĉiuj vivas feliĉe."

Malgraŭ la vortoj kaj la vizaga esprimo, oni facile legis el ŝia voĉo, ke tio estas nur ŝajnigo.

"Ho, tre bone, ke vi vivas feliĉe. Se inter la juna paro regus malkonkordo, tiam estus granda embaraso."

La patrino de Jungĉjo silentis, sed sentis ploremom kaj turnis sian rigardon al la fenestro. Ĉiaŭling bone komprenis la kaŭzon kaj aldonis:

"Jungĉjo estas saĝaca knabo kaj la juna edzino estas honesta, kio alia estus dezirinda?"

La patrino de Jungĉjo skuis la kapon kaj promeniĝis rigardon trans la fenestron:

"Kiel mi maltrankviliĝas! Vidu! Pasis nur unu monato jen la infano tute malvigligas." Ŝi montris la infanon al ŝi. "Antaŭe kia viveca infano li estis! Nun oni ne povas premi el li eĉ unu vorton. Kaj la bofilino ne scias indulgi al li."

"Ho! Kiel la situacio fariĝas tiel malbona?"

"Kiel? Ankaŭ ŝi estas senkulpa. La malsaĝuleto eĉ ne kuraĝas proksimiĝi al ŝia pordo. Antaŭ kelkaj tagoj, mi donis al ŝi monon por aĉeti frandaĵojn por li. Sed ankaŭ tio ne allogis lin. La sola rimedo estas porti lin al ŝi dum, lia dormo. Sed li ploris vekiginte en duonokto..."

Ĉi tie ŝi mallaŭtigis sian voĉon: "Onjo, diru, ĉu ŝi turmentus lin en la nokto?"

"Ne, ŝiaj samvilaĝanoj diras, ke ŝi estas honesta knabino."

"Ho onjo! Vi eble ne atentis. Rondiras famo, ke ŝi havas amanton en Dalizuang (大劉莊)... Sed mi ne scias ŝu tio estas fakto."

Ĉiaŭling tuj transprenis la paroltemon:

"Se ĝi estus fakto, kion vi faros, kiam oni postulos ŝin?"

"Tiam..."

Kun okuloj larĝe malfermitaj ŝi ne povis respondi post longa cerbumado kaj faligis sin sur la kapkusenon.

V

Ekde la edziĝa tago de Jungĉjo, Ĉiaŭling kuris tien ĉi tien, informiĝis en aliaj vilaĝoj, petis instrukcion de la superaj kadroj, nun ĝi fine decidis.

La partiĉela kunveno en la lernejo estis proponita de ŝi. En la kunveno ŝi raportis pri ĉio okazinta.

La prezidanto de la kamparana asocio starigis, dirante:

"Mi insistas pri mia antaŭa opinio. Ĉu ne estas ridindaĵo doni edzinon al infano? Kiel ja povus ili vivi harmonie?" Lia frunto kovriĝis de ŝvito.

"Ne estas maloftaĵo, ke dekjaraj knaboj edziĝas," diris la vilaĝestro.

Sed ne ĝisatendinte ke li finparolu, iu eĉ la okcidenta flanko interrompis:

"Jes, infanaj edzoj troviĝas, sed kiel iras la afero? En nia vilaĝo, ekzemple, ĉu la edzinoj de Daŝun (大順) kaj Erho (二合), ne dronigis aŭ pendigis sin pro la malkonkordo inter edzo kaj edzino, inter bopatrino kaj bofilino?"

"Jes, kian malfeliĉon portas la malnova feŭdalisma al la homoj! Nun ni vivas en nova socio, tiaĵo estas malpermesata."

La vilaĝestro jam pli humiligis. Li prezentis al ili demandon: "Ambaŭ parole kaj age ni devas havi firman starpunkton. La familio de Jungĉjo estas liberigitaj malriĉaj kamparanoj. Ĉu decas, ke ni traktas lin kiel la aliajn?"

"Sed la amanto de Zuenjo ankaŭ estas liberigita malriĉa kamparano," iu interrompis eĉ la orienta flanko.

"Tio koncernas la liberigon de virinoj, ne batalon kontraŭ bienuloj kaj dividon de batalakirita frukto," Ĉiaŭling diris laŭte.

"Pri la edziĝo de Jungĉjo, se ni ne gvidas nian penson sur ĝustan vojon, ni faros nenion bonan por li—el tie ne venos bono, ne esperu, ke ili vivos feliĉe." La tabakoleo siblis en la pipo de la prezidanto de la kampara asocio. La diskutado daŭris fervore.




En tiu vespero, Jungĉjo jam endormiĝis kaj Zuenjo frapetis lin malbonhumore: "Vekigu! Vekigu!" Ŝia bopatrino ĉesigis ŝin:

"Ne, vekite li donos al vi pli da ĝeno. Prefere portu lin en la ĉambbron." Zuenjo rifuzis pro hontemo.

"Estas ne maloftaĵo, ke granda edzino vartas sian infanedzon. Kiam mi edzinigis, mi havis dek du jarojn kaj lia patro* nur ses. Mi ne nur helpis lin surmeti ŝuojn kaj ŝtrumpojn, sed davis ankaŭ akompani lin en la ludo. Ĉiuj min laŭdis."

Zuenjo levis lin kontraŭvole. Ŝi apenaŭ atingis la antaŭĉambbron, iu nigra silueto rekte venis al la domo. Kvankam estis en la nokto, tamen oni facile vidis, ke ŝia vizaĝo ekrugiĝas. Ŝia koro batis rapide, kvazaŭ ŝi portus en la sino ŝtelajojn kaj estus kaptita sur la vojo. La silueto alproksimiĝis. Ŝi formetis Jungĉjon apud la kameno kaj iris renkonti al la venanto. Antaŭ ol ŝi povis alparoli, tiu demandis mallaŭte: "Zuenjo, ĉu vi?"

"Jes, estas mi," ŝi ankaŭ mallaŭte respondis.



La lernantinoj de Kantona Instruistina Lernejo marŝas al la sportejo

*Paŝo ĉe paŝo kun la disvolvigo de nacia konstruado kaj kun la leviĝo de popola ekonomia vivo kaj politika konscio, precipe dum la nuna kontraŭ-usona kaj por-korea movado, granda nombro da gejunuloj kaj vastaj popolamasoj montras pli profundan konon kaj pli urĝan postulon pri sporto. Por defendi sian patrolandon, multego da gejunuloj sin registrigis por la ekzameno de militaj institutoj, sed multaj el ili ne estis akceptitaj nur pro manko de fizikaj kondiĉoj. Pro la sama kaŭzo kelkaj studentoj de la Elektra-maŝina Fakto de Ĉinghua-Universitato (清華大學) ne povis aliĝi al la Maramea Instituto. Ili diris ĉagrene, "Estas ja tre, tre bedaŭrinde ke ni estas tiel malfortaj, ke ni ne povas servi en la defendo de nia patrolando!" Nun en la supre dirita universitato la nombro de studentoj partoprenantaj ĉiumatene kampan kurkonkurson

sportoj iom post iom fariĝas grava parto de la ĉfutura vivo kaj grandskala movado de la vastaj amasoj.

En la pasinta jaro, sub la kuraĝigo kaj gvido de la Kom-partio kaj Popola Reĝistaro, pro la subteno kaj helpo de la Novdemokratia Junula Ligo kaj la penado de tutlandaj gimnastikaj laborantoj, la popola gimnastika movado faris grandan paŝon antaŭen. Laŭ statistiko nekompleta, jam starigis gimnastikaj asocioj aŭ iliaj preparaj komitatoj en 42 urboj. En 1950 okazis en diversaj urboj kaj provincoj 120 grandaj gimnastikaj konkursoj kaj en 59 el ili partoprenis proksimume 290,000 sportistoj. Krome utiligante libertempon dum festotagoj, oni aranĝis multegajn pilk-konkursojn kaj atletikajn demonstraciojn kies partoprenantoj konsistis el laboristoj, armeanoj, lernantoj, terkulturistoj,

Nova Entuziasmo por Sporto

Ho Ke-ĉiang (郝克強)

jam plimultiĝas de kelkaj dekoj ĝis pli ol kvin centoj. En Pekina Universitato (北京大學) la nombro de studentoj partoprenantaj en postleciona sporto jam atingis pli ol 80% de la tuto. Energie plifortigi siajn korpojn kaj aktive partopreni en

registaraj kadroj kaj civitanoj. En Sanhajo kaj nord-orientaj provincoj okazis laboristaj gimnastikaj konkursoj dum en Uĉang (武昌), Hankou (漢口), Port-Arturo kaj Dajren okazis virinaj gimnastikaj konkursoj. Inter la armeanoj ankaŭ okazis gimnastikaj konkursoj de komandantoj kaj batalantoj. Eminentaj ĉampionoj aperis unu post la alia. Tiaj konkursoj kiel virina ferdisk-jetado, staranta antaŭensaltado, 60-metra kurkonkurso kaj 80-metra malalta-barila kurkonkurso jam rompis la tutlandajn rekordojn pasintajn. En Kantono la pedikab* laborista sport-rotto akiris triumfon en la volejbol* konkurso de la unua urba gimnastika konkurso. En Tolun (多倫), Ĉahar Provinco, 25 terkulturistoj gajnis premiojn ĉe tiea gimnastika konkurso.

Multaj el la kapablaj sportistoj estas samtempe modeloj en la kampo de produktado kaj lernado. Ekzemple, en Tienzin (天津) membro de la piedpilk-teamo de la Ĉina Kvara Spinejo estas ankaŭ unu el la laboristaj modeloj elektitaj de tiu urbo. En la entuziasma popolamasa sport-movado la plejparto de la sportistoj montras solidarecon, reciprokam amikecon kaj novan, kolektivisman sport-moraleon. Fundamente ili jam konkeris la "ĉampionismon" kaj "paradismon" de la malnova socio.

Gimnastikaj laborantoj en diversaj

partoj de la lando urĝe postulas progreson, dezirante lernadon politikan kaj profesian. Por gvidi laŭplane ilian lernadon, multaj mallong-periodaj kursoj kaj parolad-kunvenoj estas aranĝitaj en multaj urboj kaj provincoj. En lasta jaro la Prepara Komitato de la Tut-ĉinia Sporta Asocio, okazigis someran lern-kunvenon por gimnastikaj laborantoj el diversaj lokoj tra la lando. Malgraŭ malfacilaj materialaj kondiĉoj ili konkeris kune kun la popolamasoj ĉiujn malfacilaĵojn, mem konstruante sportejojn kaj necesajn instalaĵojn.

En Jasta julio la Ĉina Studenta Sport-teamo iris eksterlanden por partopreni la sport-konkurso de la Dua Kongreso de la Tutmonda Studentaro. En Jasta aŭgusto la gimnastikaj laborantoj el diversaj lokoj ankaŭ organizis ĉinan sportan vizit-grupon kaj veturis al Sovetunio por lerni ties progresemajn sportojn pri sporto.

Sendube surbaze de la nuna fundamento la popola sport-movado daŭrigos sian pluan disvolvigon. Pli vigla kaj vasta disvolvigo de la sport-movado tra la tuta lando ankoraŭ dependas de nia aktiva penado.

Esp-ĝis I. K.

* Trirada veturilo kvazaŭ kombinaĵo de rikŝo kaj biciklo.
† Angle, volley ball.



Teksado paperotranco de Liĉjun kaj Niu Kuej-ĵing

Kiam ŝi tiris Ĉiaŭling en la ĉambrom, ĉi tiu diris emocie:

"Dakang (大康) venis, li volas interkonsiliĝi kun vi."

Tiu novaĵo ŝajnis al Zuenjo subita tondro en serena vetero. Ŝia gorĝo estis ŝtopita de acida akvo. Ŝi stultiĝis dum kelkaj minutoj kaj diris fine:

"Kie li estas?"

"En mia domo."

"Li venis gustatempe, ni forkuru hodiaŭ."

"Kien forkuru?"

"Ni serĉos laboron trans Ŝanhajkuant..."

"Vi parolas nur sensecaĵojn, la ĉielo estas nia ĉielo, la tero — nia tero, kaj ni estas la mastro de la ŝtato. Ni ne estas proskribitoj, kial forkuru? La leĝoj de la malnova socio ne validas plu."

"Kia malfacila situacio! Kaŭzon de malpaco mi ne trovas. Kiel mi povus procesi kontraŭ ili?"

"He! kial malpaci, kiam oni povas solvi la problemon racie?"

Kiam ili parolis en la ĉambro, ekaŭdigis vekrio, kaj la patrino de Jungĉjo laŭte diris kun aliĝita voĉo: "Ho mia bona bofilino, rompu mian kaldronon, bruligu mian domon, sed vi ja neniel kuŝigu mian infanon sur malvarma tero! Enpaŝante la ĉambrom ŝi ekrimarkis Ĉiaŭling:

"Ho onjo! Feliĉe mia piedo frapetigis kontraŭ li, alie... kiom da zorgo mi dediĉis al la vartado de mia infano, kvazaŭ brodado, stebon post stebon, ĉu estas facilajo!"

Ankaŭ Ĉiaŭling ĉagreniĝis:

"Jes, kion fari se li malsaniĝus?"

Zuenjo staris apude kun la kapo klinita kaj la buŝeto elpuŝita, ne povante sin komprenigi kiel mutulo kiu manĝis maldolĉaĵon.

Ĉiaŭling gvidis la maljunulino en la ĉambrom. Tiu plendis plorante:

"Ŝi jam decidis ne plu kunvivi kun ni."

Ĉiaŭling konsolis ŝin, tiam la maljunulino eligis la tutan sekreton en sia koro:

"La bofilino estas la fonto de ĉio malagrabla. Kreskas la familio, sed dezertiĝas la tero. Kvazaŭ metinte la nudajn piedojn en dorĉejon oni povas nek antaŭen iri nek retroen iri. Kia dilemo!"

"Onjo, la situacio estas sufiĉe klara. Ĉu vi faros necesan paŝon?"

"Jes. Sed la vorton 'disiĝi' mi neniel povas eligi unua."

"Bone, ĉio estos solvita racie."

"Ej! Oni diros, ke mi eĉ ne scipovas manipuli bofilinon."

"Jen ne estas la problemo ĉu scipovi aŭ ne scipovi manipuli la bofilinon. La ĉefa punkto estas tio, ke vi disiĝos, ĉar vi ne povas kunvivi

harmonie. Nun ĉio iros bone post la disiĝo. Kiu ja rajtas ridi je vi? Onjo, vi havas nur kvardek kaj kelkajn jarojn. Nenio malhelpas vin aliĝi al la interhelpaj grupoj. Kial ne laboru, kiam vi povas labori? Cetero, por Jungĉjo estas tempo por viziti lernejon. Se vi neglektus lian edukon, li plendus kontraŭ vi dum la tuta vivo. Ĉu mankos al li edzino kiam li plenkreskos? Hodiaŭ vespere, Dakang, la amanto de Zuenjo ankaŭ venis."

"Ĉu efektive?" Ŝi kaptis la brakon de Ĉiaŭling.

"Jes, efektive."

"La konto estu tuj reguligita. Mi satĝuis tian feliĉon! Dum la pasinta monato mi multon spertis. Tuj! Tuj!"

"Onjo, mi timas ke vi ĉagreniĝus."

"Kial mi ĉagreniĝu? Estas ni kiuj disiĝis ilin la geedziĝontan paron: Kiu scias kiel ili ĉagreniĝis!"

Jungĉjo nur ŝajniĝis dormi. Li aŭdis ĉion. La etulo ekstaris kun emocio.

"Onjo, oni tuj forkonduku ŝin!"

Ĉiaŭling premis lin en sian sinon dirante: "Bona infano, elektu edzinon memvole kiam vi plenkreskos, iun scipovan legi kaj skribi."

"Ne, mi neniam prenos edzinon. Kia superfluaĵo!"

VI

Tiun nokton ĉiuj tri maldormis. La duan matenon, kiam apenaŭ krepuskiĝis en la oriento kaj morta silento ankoraŭ regis sur la strato, Dakang kondukis sian mulĉaron klakante al la pordo de Jungĉjo. Zuenjo jam pretiĝis. Ĉiaŭling helpis ŝin elporti la pakajojn. Dakang trenis en la domon du sakojn da triĉiko, kiujn li kunportis en la ĉaro.

"Onjo, por tiu afero vi elspezis ne malmulte. Mi ne povas igi vin perdi kaj homon kaj monon. Tiuj ĉi du sakoj da greno estas por..."

"Ho, tiaĵo ja ne mankas al ni liberigitoj."

"Onjo, mi neniam trankviliĝos se vi ne akceptas."

"Jes, akceptu. Ĉar li jam alportis, estus maldece ĝin reportigi," diris la kadroj.

La patrino de Jungĉjo diris al Dakang: "Mia infano, ne koleru kontraŭ mi, maljuna stultulino. Mi scias nenion pri la afero inter vi."

"Vi ne estas kulpa, kulpas nur la malnova feŭdalisimo," diris Dakang.

Zuenjo alpaŝis:

"Panjo, mi foriras, kie mi kondukis malbone dum tiu ĉi monato, diru al mi, mi korektos."

"Vi faris nenion malbonan, vi estas saĝa knabino..." Si aldonis post momenta medito: "Nur la hieraŭ-vesperan okazaĵon mi..."

Ĉiaŭling interrompis: "Zuenjo klarigis al mi poste. Tio ne devenis de malice. Ŝi faris tion simple pro honto en mia ĉeesto. Ŝi ja intencis porti lin en la ĉambrom post mia foriro."

"Ho! Sen tiu klarigo mi neniam forgesos. Pro tiu afero la infano multe suferis, kaj ankaŭ onjo multe penis. Mi jam plisaĝiĝas, spertinte tion en mia maljuna aĝo. Mi ne havas alian infanon, ĉu vi volas esti mia adoptita filino? Kiel mi ŝatas vin..."

La okuloj de la maljunulino estis larmoplenaj.

"Bone, panjo, mi ĉiam vizitos vin en la estonteco."

"Tre bone," diris la prezidanto de la virina asocio. "Tiaĵo neniam okazis en la malnova socio."

Fine, Zuenjo diris al la prezidanto de la virina asocio: "Fratino, por mi vi elĉerpigis korpe kaj spirite. En la estonteco mi laboros laŭ via modelo."

La Kvarajfoja Bato

— Al la batalantoj sur la korea fronto —

Ho, kamaradoj, jen vi kvaran fojon Mutigis klabe la rabian bojon,

Kaj novan paĝon de glor-epopeo Vi skribis por Ĉinio kaj Koreo!

En via fera brusto, ho leonoj! Batas la kor' de kvincent milionoj,

Kaj nur plenumis vi en la batalo La volon de la tuta pactendaro.

Jes, ni klopodas ĉiam por la paco, Sed ne timigos nin milit-minaco.

Foje ekstariginte surpiede Jam al neniu ni kliniĝos cede.

Kaj nevenkeblaj estas fortoj kunaj De tiuj du giganto-fratoj junaj.

Antaŭ ĉi tiu nova Granda Muro Tuj frakasigos ĉiu agresulo.

Vanaj klopodoj de l' kalumnianto pruvigas aerpufo kontraŭ monto.

Kaj kontraŭ la usona sangdiboĉo Ĉie levigas jam indigna voĉo.

Homsorton ne decidus plu dolaro Sed la tutmonda paca popolaro.

Tremu la hitleridoj en Usono! Jen estas bona por ili admono:

Se ĝi kuraĝos provi fojon kvinan Rieevos ĝi sendube baton finan

Kaj kuŝos ĉiam kun la atombombo En sia longe memfositaj tomo!

S. J. Zec

Kiam la mateno suno apenaŭ montris ruĝan strion, homoj amasiĝis iom post iom. Zuenjo jam arangiĝis ĉion. Adiaŭinte Jungĉjon kaj lian patrino, la kadrojn kaj la najbarojn, ŝi sidiĝis en la ĉaron. Ankaŭ Dakang diris adiaŭon al la amaso. Li levis la vipon kaj veturigis la mulĉaron okcidenten. Li iris ne malproksimen, kiam iu alkriis post li: "Atendu!" Jungĉjo postkuris kun pakajo. Alproksimiĝante li jetis ĝin en la sinon de Zuenjo:

"Kunportu!"

Zuenjo malfermis ĝin kaj ekzamenis: "Reportu, ĝi ne estas mia."

"Mi donas al vi, do prenu, ne zorgu ĉu estas via aŭ mia: Kial tiel honteme?" Jungĉjo diris petoleme.

Post li jam alkuris lia patrino.

"Aŭskultu, bona infano. Kvankam tiuj flor-desegnitaĵ vestoj estas pretigitaj de mi, tamen mi ne havas filinon kaj vi estas mia adoptita filino, do kiu ilin portu, se ne vi?" Prenu kiel memorajon. Ili memoriĝos vin pri la maljunulino kiam vi vidos ilin kaj vi venos min viziti."

"Mi venos, mi nepre venos..."

La rigardantoj diris unuvoĉe: "Jen la ĝusta vojo. Nenio estas pli bona ol disiĝi amikece. Ne dolĉas melono desirita perforte."

La mulo kuris tre rapide kaj ili baldaŭ malaperis en la malproksimo. La patrino de Jungĉjo spiris kun plifaciliĝo kaj tuj iris en la kamparon kun terhakilo sur la ŝultro.

Trad. S. J. Z.

* Laŭ malnova kutimo tiel nomas sian edzon la ĉina virino.

† t.e. ekstere de la montpasejo Sanhajkuan (山海關) en Nordorienta Ĉinio.

POST la publikigo de "Pri la Praktiko", la grava verko de prezidanto Maŭ Ze-tung, disvastiĝas ĉie en la lando la tajdo por studi tiun artikolon. Multaj ĵurnaloj, gazetoj publikigis artikolon pri ĝi aŭ raporton pri la studo. La Societo de Nova Filozofio unue okazigis kunvenon gvidatan de fama filozofo Aj Se-ĉi (艾思奇) por interŝanĝi opiniojn. La literaturaj rondoj ankaŭ mobilizigis por tiu studo. La Literatura Gazeto (文藝報) kaj Popola Literatura Gazeto (人民文學), la du ĉefaj literaturaj gazetoj en Popola Ĉinio, unu post la alia publikigis artikolon por klarigi la gravecon de tiu verko al literaturaj verkado kaj kritiko. La Tutĉinia Federacio de Literaturistoj kaj Artistoj jam planis bone organizi la literaturajn kaj artistajn rondojn por la studo de tiu grava verko de Prezidanto Maŭ Ze-tung.

LA KONSTRUO de la Sanatorio por Aziaj Studentoj komencas je la 21a de lasta monato, la tago de batalo kontraŭ kolonia sistemo. La sanatorio situas en Varmfonta Parko (溫泉公園) de Malgranda

Tangsan (小湯山) la pitoreska regiono norde de Pekino. La konstruadon kontrolas la Tutĉinia Federacio de Studentoj komisiite de la Tutmonda Federacio de Studentoj. La ceremonion ĉeestis la reprezentantoj de ĉiuj junulaj organizoj en Pekino kaj la reprezentantoj de la studentoj el Koreio, Vietnamo, Burmo, Indonezio kaj tiuj de Orient-eŭropaj popol-demokratiaj landoj.

LASTAJARE plej parto de Orienta Ĉinio efektiviĝis la agrote-

formon. Tuj post tio la liberigitaj kamparanoj enjctis sin en la altan tajdon de sinklerigo. Vinttra lernejo fariĝis por ili la plej ŝatata. Nun la lernantoj en tiaj lernejoj nombras pli ol 2,000,000 en Ŝantung-Provinco, pli ol 500,000 en norda Kiangsu-Provinco, 600,000 en suda Kiangsu-Provinco, kaj nur en 5 gubernioj de suda Anhuĵ-Provinco fondiĝis jam 1,215 vintraj



lernejoj. Konformante al tiu bezono grandskala trejnado de instruistoj, pogranda eldonado de legolibroj ankaŭ bone prosperas. Nur en Ŝantung-Provinco jam 2,400,000 ekzempleroj de legolibro estas presitaj.

LA FAMA verko Raporto Sub Eŝafodo verkita de Julius Fuĉik, la granda revoluciisto, unu el la gvidintoj de Ĉeĥoslovaka Kompartio kaj ĉefredaktoro de "Ruĝrajto," lastatempe trovis sian novan eldonon en ĉina traduko. La verko rakontas la historion de la antifaŝista batalo de la ĉeĥoslovaka popolo. En ĝi penetras ĉie la senkompromisemo kontraŭ la malamikoj kaj fido al la venko de la revolucio. Ĝi ricevas grandan aprobon de la ĉinaj legantoj. La unua eldono de ĉina traduko eldoniĝis jam antaŭ jaraj. Nun ĝi estas denove prilaborita de la tradukinto s-ro Liu Liaŭ-ĵi (劉逸逸).

kaj la Tutĉinia Artista Asocio aranĝis sinsekve en la Laborista Kultura Paĝaco kaj la Imperia Paĝaco artajn ekspoziciojn.

La muzikistoj ankaŭ mobilizigis en la komponado de patriotaj kaj kontraŭagresaj kantoj. Laŭ nekompleta statistiko nur ĝis la fino de lasta jaro la publikigitaj kantoj nombris pli ol 1,100.

Filma monato aranĝita de la Pekinaj kinejoj rikoltis la plej grandan sukceson. En unu monato prezentigis 30 novaj filmoj al pli ol 600,000 rigardantoj.

BILDOLIBROJ estas la plej ŝatataj legaĵoj de la geknaboj, laboristoj kaj aliaj civitanoj, kiuj ne ricevis sufiĉan edukadon, ĉar ili konsistas el serio da sinsekvaj bildoj nur kun tre malmulte da klarigoj. Tial estas tre facile ilin kompreni. Antaŭe neniu el la seriozaj eldonejoj prizorgis la kompiladon aŭ eldonadon de tiaj legaĵoj. Iliaj enhavoj estis ekskluzive superŝtiĉaj, voluptemaj kaj venenaj. Post la liberigo organiziĝis Popolara Bilda Eldona Societo, kiu surprisn sur sin la taskon plibonigi tiajn bildolibrojn ambaŭ enhave kaj arte. Lastatempe ĝi eldonis jam multajn tiajn librojn kompilitajn laŭ famaj verkoj aŭ popularaj rakontoj.



FRANCIO KOLONIIGANTA Estimata kamarado,

Kia ĝojo! Kia kontentego! Kia admiro, kiam mi ricevis vian belegan gazeton, mi dankas vin multege milfoje. Mi estas granda amiko de l' ĉina popolo. Mi sekvis admire la heroan lukton de tiu popolo kontraŭ la imperiistoj. Finafine vi gajnis vian liberecon dank' al viaj inteligentaj ĉefoj. Vivu Maŭ Ze-tung!

Vi estas nun liberaj, sed ne forgesu la aliajn popolojn, precipe la malfeliĉan korean popolon. Ĉetere la franca popolo luktas ankaŭ forte, ĉar nia gubernio estas vendata al malbonaj usonanoj. Pli kaj pli nia lando fariĝas faŝista. Oni arestas la patriotojn sed kontraŭe oni liberigas la perfidulojn. Mia gubernio preparas aktive militon kontraŭ Sovetlando ĉiam sub la ordonoj de niaj Usonaj mastroj.

Sed la franca laborista klaso ne dormas, la lukto estas ĉiutaga. Nia granda komunista partio estas tre vigle, atente direktata de nia kamarado Maurice Thorez.

Mi estus tre kontenta ricevi regule vian gazeton kaj korespondi kun ĉina kamarado pri ĉiuj temoj, mi respondus ĉiam.

Robert. Farail,
Francio.

AŬSKULTU LA PLENDON DE JAPANOJ!

Karaj kamaradoj:

Multajn dankojn por via bul-teno.....

La 26an de aŭg. mi estis maldungita pro tio ke, mi estas ruĝulo (maldekstrulo)! Mi estas elektroteknikisto kaj laboris en elektrotformejo de... Ni ĉiam batalis kontraŭ la koloniigo de japana elektro-industrio kaj por la bonigo de nia vivkondiĉo. Sed la faŝista Joŝida registaro ignorante la bonon

de nacia industrio kaj la vivon de la popolo intencas dividi la japanan elektro-industrion en 9 blokojn, starigi tie industriajn bazojn, kiuj havas militajn karakterojn, garantii certan profiton por la monopolemaj kapitalistoj, suferigante la japanan popolon per la ŝarĝo de militbazo.

Tial ili volas prunti kapitalon el eksterlando, meti la reĝpotencon de elektro-liverado en la manojn de monopolemuloj kaj tiel ili intencas reorganizi la elektro-industrion por regi la tutan japanan industrion. Pli, la imposto por la eksterlanda kapitalo kaj eksterlandanoj fariĝos nur nominala, kaj ili libere sendos la profiton al sia hejmlando sub leĝa garantio.

Sekve, ju pli peze ni laboros, des pli multe da japana riĉaĵo elportigos eksterlanden, kaj la elektro-industrio neniel povos restarigi.

Krom tio, ili importas eksterlandajn nutraĵojn por preskaŭ duobla prezo kompare kun tiu de enlanda rizo, eĉ sendogane kaj pli ol ni bezonas.

Por konstrui milit-bazon ili intencas elspezi kelkdek milionojn da "ĵenoj", kiuj estis eldevigitaj de la popolanoj tiel kruеле, ke bankrotis butikoj kaj fabrikoj aŭ sinmortigis tutaj familioj. Rilate al elektro-prezo kaj elektro-distribuo militaj industrioj estas bone traktataj kaj estas ignorataj pacaj industrioj kaj kulturaj vivoj. Jen kiel la koloniiga kaj militbaziga politiko de Joŝida faŝisma kabineto fariĝas pli kaj pli malkaŝa.

La divido de elektra industrio estas plenumota kiel ĝia lasta kompletigo. Ni povas aserti, ke tiu ĉi rimedo kondukas nin al la malaminda milito.

Tial ni firme kontraŭbatalas al la regnoperfida divido de elektro-industrio, koloniiganta Japanion kaj celas konstruon de demokrata Japanio, vere libera, pacema kaj memstara!

Nun mi estas senlaborulo, sed mi laboras ĉiam kontraŭ la koloniigo de Japanio kaj por la paco!

Vivu Ĉina Popola Respubliko!
Vivu Ĉina Liberiga Armeo:
Vivu ĉina Esperanta Movado!

Y. T. el Japanio

EN LA movado kontraŭusona kaj porkorea mobilizigis ĉiuj branĉoj de la literatura kaj artista rondoj. La artistaj organizoj inkluzive de la Centra Arta Istituto

PAGU AL NIAJ PERANTOJ

- Belgio:** Toussejn Camille, 35 Statiestraat, Jabbeke (W. VL) (Jarabono: 50 bfr.)
Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10 Bruselo.
- Britlando:** Collet's Subscription Department, 40 Great Russell Street, London, W.C. 1. (Jarabono 6 ang. ŝil.)
- Ĉeĥoslovakio:** Slovaka Esperanto-Instituto, T. S. Martin, Kuzmany-str. 29. ĈSR-Slovakio. (jarabono 50 kĉs.)
Burda Rudolf, Plzen-palackeho N. 66.
- Finnlando:** Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14 Turku. (Jarabono: 300 Fmk.)
- Francio:** Labor-Esperantista Federacio, 34, Str. Chabrol-PARIS-X. (CCP. Paris 902-52) (Jarabono: Fr. Fr. 450)
- Germanio:** Arthur Schulze, Berlin-Lubars, Kolonie, Waldes-frieden 77. (Jarabono: 6 D.M.)
Erich Rodel, Leipzig W. 33, Becherstr. 10.
- Hungario:** IBUSZ, Budapest, V. Akademia u. 10. (Jarabono 20 forintoj)
- Italio:** Itala Laborista Esperanto-Asocio, Via Modena 33-Torino. (Jarabono: 400 liroj)
- Izraelio:** Bencion H. Danon, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)
- Norvegio:** Norvega Esperantisto, Redaksjonen, Boks 942, Oslo. (Jarabono 6 kronoj)
- Pollando:** Isaj Dratwer, -Asocio de Esperantistoj en Pollando Warszawa Marszalkowska 81/32 (Poŝteka konto P.K.O. I 8266/115) (Jarabono 12 zl.)
- Rumanio:** Rumana Esperantista Societo, Bucuresti I, Bulev. 6 Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)
- Svedio:** Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 6.50 kronoj)

- Rim
- 1) Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas regule ricevi nian gazeton, pagu laŭ la supra tarifo.
 - 2) Legantoj en ceteraj landoj povas aboni nian gazeton ankaŭ ĉe iu el la supraj perantoj al kiu li trovas rimedon pagi aŭ rekte ĉe nia adminstracio per internaciaj respond-kuponoj (1 respond-kuponon por ĉiu ekzemplero) aŭ samvaloroj novaj esperantaj libroj, sed de individuaj legantoj ni ne akceptas gazetojn.
 - 3) Korospondan anoncon ni ne akceptas pro manko de spaco.

國內定價：每期基價一元五角。全年十二期基價十八元。平寄郵費在內。掛號另加。